**Protokolo de la komitatkunsido de ILEI**

**2025.07.21**

**12:00-16:00 UTC**

**Partoprenis: entute 40 komitatanoj (ĉeeste kaj rete).**

**Anstataŭo:**

Latifou Gbadamassi al Aimé-Patrick Manirakiza;

Kristin Tytgat al Marc Cuffez;

Ermanno Tarracchini al Luigia Oberrauch Madella;

Christof Krick kaj Rudolf Fischer al Zsófia Kóródy;

Emmanuel DESBRIERES al Didier Janot;

Stefan MacGill al Jozefo Nemeth.

**Tagordo**

1. Malfermo.
2. Kontrolo de kvorumo, inkluzive de la delegoj.
3. Elekto de voĉnombrantoj.
4. Elekto de protokolantoj.
5. Aprobo de la protokolo de la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024.
6. Kontrolo de la komitataj decidoj en la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024.
7. Aprobo de la jarraporto (de 08-2024 al 07-2025).
8. Klarigo pri la gvidlinioj de la laborplano.
9. Aprobo de la Raporto de la Kontrola Komisiono por 2024.
10. Aprobo de la Financa Raporto 2024.
11. Aprobo de la Buĝeto 2025.

12. Anonco de la loko de la ILEI-Kongreso de 2026.

13. Anoncoj de la komitatanoj.

**Iro de la kunsido**

**Punkto 1. Malfermo.**

Bonvenigis kaj dankis ĉiujn Ahmad Resa Mamduhi, la Prezidanto de ILEI. Li substrekis, ke la Komitato kunsidas en tempo de novaj teknologiaj kaj aliaj defioj, kiuj influas unuavice al edukado. Tiusence agado de ILEI estas aparte bezonata. Li deziris fruktodonan laboron al la Komitato kaj malfermis la kunsidon.

**Punkto 2. Kontrolo de kvorumo, inkluzive de la delegoj.**

Elena Nadikova, la sekretarino de ILEI, tranombris ĉiujn komitatanojn, kiuj transdonis siajn voĉojn al siaj kolegoj laŭ iliaj anoncoj. Marc Cuffez klarigis pri Kristin Tytgat kaj Dider Janot – pri Murielle Caré. El Francio nun estas du komitatanoj, ĉar oni ne trovis anstataŭanton por Murielle.

Do, en la Komitatkunsido partoprenas dekomence rete 27 personoj kaj ĉeeste 10 (Dider Janot kun du voĉoj). Aperis demando, ĉu nekomitatano rajtas anstataŭi iun komitatanon eĉ el alia teritorio? La Statuto kaj Interna Regularo tion ne permesas. Tamen Ahmad klarigis, ke UEA faras tiel laŭbezone kaj proponis fari same, se la Komitato konsentos por ĉi-foje. Ne venis kontraŭoj. Sekve, en la Komitatkunsido partoprenas entute 38 personoj. **La kvorumo estas.**

**Punkto 3. Elekto de voĉnombrantoj.**

Ahmad demandis, kiu deziras esti voĉnombrantoj. En salono estos Rob Moerbeek kaj

Araksja Elbakjan kaj virtuale Ahmad Mamduhi. **Decidite.**

**Punkto 4. Elekto de protokolantoj.**

Protokolas Elena Nadikova. Estos registraĵo, kiel kutime. **Decidite.**

**Punkto 5. Aprobo de la protokolo de la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024.**

Ahmd sendis ĝin al ĉiuj komitatanoj kaj denove montris surekrane. Li proponis eldiri komentojn, aldonojn, kontraŭojn. Ahmad mallonge trafoliumis kaj komentis la protokolon. Ne venis komentoj aŭ kontraŭoj kaj okazis voĉdono: ĉiuj 39 estas por (aldoniĝis nova

komtatano en Zoom). **<u>Decido: la protokolo de la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024 estas aprobita.</u>**

**Punkto 6. Kontrolo de la komitataj decidoj en la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024.**

Ahmad remontris denove la protokolon kaj komentis ĉiujn decidojn, Ĉiuj decidoj estis plenumitaj. Okazis voĉdono. En salono dume venis ankoraŭ unu komitatano el Ĉinio kaj sekve estas 11 komitatanoj ĉeeste. Ĉiuj ili voĉdonis jese same kiel ĉiuj en Zoom. Do, 40 voĉoj por. **<u>Decido: la komitataj decidoj en la Komitat-kunsido de la 22-a de julio 2024 estas kontrolitaj kaj plenumitaj.</u>**

Foriris Aranka kaj en la salono restas 9 komitatanoj kun 10 voĉoj.

**Punkto 7. Aprobo de la jarraporto (de 8-2024 al 7-2025).**

Ahmad sendis ĝin kelkfoje al ĉiuj komitatanoj. Ahmad denove montris, trafoliumis kaj komentis ĉiujn punktojn de la Jarraporto. Aristophio Andrade ALVES FILHO rimarkis eraron en la dato de la ILEI-kongreso en Brazilo. Ahmad korektis la daton.

Alessandra komentis kelkajn projektojn ( “30 oraj horoj”, kiu estis prezentita dum la universitata konferenco en Milano, Italio; Komuna Legado, por kio estas proponita la parto de la teatraĵo “1910” de E.Amis kaj la rondiranta rakonto “Pri viroj kaj kunikloj”; “Homa ĉeno”, kiu atingis 1000 homojn kaj estas daŭriganta; pri Premio LA Torre); detale ŝi rememorigis pri eldonaĵoj de ILEI, informis pri virina agado de ILEI kaj kunlaboro kun FIPLV kaj rakontis pri sia instruado en Universitato de Zaozhuang .

Marija Belošević komentis pri Tago de Lernado dum UK-2026.

Aimé-Patrick Manirakiza rakontis pri sia nova projekto en Burundo (unstruista trejnado) kaj ĝiaj unuaj rezultoj.

Ahmad substrekis la gravecon de tiu klerigada projekto.

Marija Belošević informis pri Movada Foiro dum UK; ŝi ankaŭ menciis, ke en 2024 Tago de Lernado dum UK en Tanzanio estis inter malmultaj programeroj, kiuj estis elsenditaj rekte desurloke, kvankam okazis problemoj kun la reto. Ŝi dankis ILEI-n, kiu havis komprenon kaj investis, aĉetante kartojn, kio ebligis elsendon.

Substrekis la Prezidanto Ahmad Mamduhi ankaŭ alispecajn kunlaboron kun UEA kaj TEJO, kun edukado.net kaj ekstermovadaj institucioj (UNESKO, FIPLV).

Dider Janot informis pri laboro ĉe UNESKO.

Fine la Prezidanto dankis ĉiujn samideanojn pro ilia sindona laboro por ILEI kaj Esperanto kaj proponis eldiri komentojn. Ne venis

Marija Belošević kompletigis ka jarraporton pri ekstera agado kunlabore kun UEA: 2026.02.22 okazis la 112-a AMO-seminario okaze de la Semajno de Internacia Amikeco kun la temo "Renato – ĉies amiko". Ĝin partoprenis i.a. pluraj membroj de ILEI. Estis impona kaj bela programo. Ŝi proponis enigi tiun eventon al la Jarraporto de ILEI.

Ahmad aldonis, ke Renato restas kvazaŭ vivanta por ni kaj en Tajvano oni planas eldoni specialan numeron dediĉitan plene al Renato el diversaj artikoloj. Ahmad esprimis esperon, ke ni daŭrigos la ideojn de Renato en sekva agado.

Poste okazis voĉdono: unuanime sen kontraŭoj kaj sindetenoj. **Decido: la Jarraporto estas aprobita.**

**Punkto 8. Klarigo pri la gvidlinioj de la laborplanoj.**

La laborplano jam estas aprobita kaj ne bezonas voĉdonon, tamen necesas rememorigi ĝiajn punktojn. Ahmad klarigis: la plano estas tre ambicia, tial eĉ se ni sukcesos realigi parton, tio estos bona atingo. Li tralegis la planon kaj komentis ĝin. Poste Ahmad proponis aldoni demandojn – komentojn.

Mireille Grosjean aldonis pri la grava avantaĝo de la projekto «Unu lecionon pri Esperanto por ĉiuj lernantoj de la mondo»: ne estas bezonata ĝuste esperantisto por tiu leciono, ĉiu instruisto/ studento k.a. povas preni diversajn materialojn pri Esperanto kaj fari lecionon. Plu ŝi informis pri la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Samarkando, Uzbekio, en oktobro-novembro (31.10-15.11.2025). Estos diversaj delegitoj nome de UEA kaj esperelble ili havos 3 minutojn en la podio por proponi, ke la 26-a de julio iĝu oficiale la Internacia tago de Esperanto. Ĵus la delegitoj ricevis informon pri loko, organizado kaj rajtoj de NRO.

Dider Janot informis, ke kutime NRO dum Ĝeneralaj konferencoj rajtas havi po 5 reprezentantoj. Li proponis trovi kaj sendi ankaŭ de ILEI membrojn, des pli ke estas bona okazo por azianoj pro geografia loko.

Mirejo rememorigis, ke nur UEA estas en rilatoj kun UNESKO, dume ILEI estas nur observanto. Tio signifas, ke se ILEI petos parolvicon, ĝi ne ricevos. UEA rajtas paroli, ĉar estas oficiale agnoskita de UNESKO. Jes, kutime estas 5 reprezentantoj, sed praktike ne

ĉiam: ekzemple, dum hodiaŭa informado flanke de la organizantoj ne venis sciigo pri 5 partoprenantoj. Do, decidoj venos septembre, ni vidos.

Dider Janot konfirmis diritaĵon de Mirejo, tamen substrekis, ke ILEI tamen rajtas sendi 5 reprezentantojn. UNESKO havas liston de 9 NRO, kiuj kutime ricevas inviton. ILEI estas inter tiuj 9. Tio signifas ke la Ĝenerala Direktoro kutime proponas al la Ĝenerala Asembleo, ke tiuj 9 NRO ricevu inviton al la konferenco.

Mirejo rimarkis, ke decido estas en mano de la Ĝenerala Direktoro kaj instancoj de UNESKO, ne Asembleo, Ĝenerala Asembleo decidas pri aliaj aferoj, tamen ŝi konsentas, ke estus bone, se ILEI trovus 5 volontulojn, pretajn veturi al Uzbekio. Ili povos sekvi la konferencon per la reto, sed ne paroli. Ne estos hibrida kunveno. La ideo de UNESKO estas doni ŝancojn al aliaj NRO, kiuj situas en tiu regiono.En tiu konsidero ŝi pensas pri esperantistoj en Mongolio, Nepalo, esplorenda afero.

Alessandra Madella rimarkis, ke partopreno en la konferenco en Uzbekio estas ĉi-foje tro multekosta, multe pli multekosta ol en Parizo, ĉar en Samarkando oni speciale konstruis novan altnivelan hotelon. Tial povas esti, ke venos malpli da homoj. UEA estas sekura en tiu senco, sed por ILEI la afero ne klaras: povos okazi, ke la Ligo ne ricevos konsenton pri siaj delegitoj kaj ni ekscios pri tio nur lastmomente. Krome, se ni sendos homojn, ni devos pagi tre altan vojaĝkoston sen plena certeco. M.Garcia volas veni kaj esploras nun pri aliaj vojoj, ĉar ILEI ne certas. Ni vidu. Alessandra pensas, ke ne estas ŝancoj por ĉi-jaro por ILEI.

Mirejo informis, ke estos kongresa zono de 200 gektaroj kun kongres-centro kaj ekspoziciejo kaj oni povos trovi tute normalan hotelon en la urbo kaj per buso atingi la kongresan zonon. Luksaj hoteloj ne estas devigaj por la partoprenontoj.

Ahmad demandis, ĉu iu el la komitatanoj deziras kandidatiĝi por partopreno en la konferenco? Ne estis dezirantoj. Ahmad proponis daŭrigi la alvokon, precipe inter la aziaj landoj helpe de Didier kaj Mirejo. **<u>Konsentite.</u>**

**Punkto 9. Aprobo de la Raporto de la Kontrola Komisiono por 2024.**

Ahmad montris la raporton de la Kontrola Komisiono kaj dankis la kasistinon Karine Arakeljan. Ĉiuj komitatanoj havas la raporton. Ahmad demandis Karine, ĉu necesas iuj komentoj pri la raporto? Karine informis, ke nia kontrolisto el Nederlando Ralph Schmeits petas anstataŭi lin, ĉar jam iĝis malfacile por li fari tiun kontrolon pro la sanstato. Necesas trovi alian kontroliston.

Ahmad petis ĉiujn serĉi inter amikoj / konatuloj fakulon pri tiu laboro kaj informi Karine. Karine rimarkis, ke la Komitato devas aprobi la kandidaturon de la kontrolisto. Ahmad proponis aprobi rete. Karine ne scias la taŭgan personon el aliaj landoj, nur el Armenio, sed tio ne eblas, ĉar armenino jam ĉeestas en la Kontrola komisiono. Ahmad proponis komenti la raporton. Ne venis komentoj, okazis voĉdono pri la raporto: 7 voĉoj en la salono kaj ĉiuj jesoj en la reto. **Decido: Raporto de la Kontrola Komisiono por 2024 estas aprobita.**

**Punkto 10. Aprobo de la Financa Raporto 2024.**

Ahmad montris ĝin: bilancon de 2024 kaj financajn rezultojn de 2024. La raporto estis sendita al la Komitato. Karine komentis. Ni havas sufiĉe grandan deficiton. Parte tio devenas pro tio ke post la antaŭa kongreso ni faris pagojn en 2024. Ankaŭ pro la revuoj, precipe pro Juna Amiko, ĉar multaj preferas nuntempe aboni retajn versiojn. Papera formato estas pli preferinda, sed pli kosta. Plu Karine proponis fari demandojn / komentojn. Mihaj Trifoi demandis pri abono por Juna Amiko, Karine faros. Ne estis pliaj komentoj kaj okazis voĉdono: 8 en la salono kaj 22 en Zoom, entute 30. **Decido: la Financa Raporto 2024 estas aprobita.**

**Punkto 11. Aprobo de Buĝeto 2025.**

Ahmad montris ĝin kaj komentis. Karine komentis: la buĝeto ankaŭ estas deficita pro unuavice la revuoj. Ahmad proponis demandi/komenti.

Dider Janot rimarkis, ke jam iras la jaro 2025, t.s.ke ni ne povas ion ŝanĝi en la buĝeto-2025. Pli bonus, se ni aprobus en la kuranta jaro buĝeton por la sekvonta jaro, kiel faras, ekzemple, UEA. Karine kontraŭis, ke ni povas ion korekti.

Tamen Didier insistas, ke ni devas pripensi pri la buĝeto-2026. Li rimarkis, ke novuloj pli preferas retajn eldonojn kaj kaze de deficito pro paperaj versioj ni devas pripensi tiun problemon (ekzemple, plialtigi la prezojn por paperaj eldonoj). Li proponis dum sekvaj monatoj okazigi kunvenon por diskuti tion, eĉ antaŭ la jarfino. Fakte la solvon eblos trovi rapide, laŭ li.

Karine rimarkis, ke plialtigo de kostoj ne havas sencon, ĉar homoj ne volas multe elspezi. Kaj paperaj revuoj estas multe pli prestiĝaj. Sed ŝi konsentas pri aparta kunsido pri tiu temo.

Ahmad rememorigis, ke ni havis jam apartan kunsidon pri revuoj kaj aŭskultis multajn proponojn, tamen fine ne atingis iun solvon. Ahmad rememorigis iom la tiaman diskuton: altigo de prezoj kaŭzos perdon de abonantoj; malmultigo de paĝoj aŭ kvanto da numeroj jare same havos nebonajn konsekvencojn. ILEI ne estas profitcela organizo, ni tiel agis, ekzemple, kun la lernolibro en suahila. Ni povas evoluigi endajn kaj indajn aferojn eĉ kaze de perdo de mono. Nia misio estas daŭrigi la bezonatajn projektojn, ekz, pri paperaj revuoj. Ahmad esprimis esperon, ke ni trovos aliajn fondusojn kaj rimedojn por plu havi paperajn revuojn. Do, resume: ni nenion ŝanĝu pri la revuoj, sed trovu novajn rimedojn.

Karine diris, ke efektiva kaj insista agado en aliaj kampoj povos doni al ni rimedojn kaj kovri la elspezojn de niaj valoraj revuoj.

Rob Moerbeek rimarkis, ke en UEA ekzistas speciala rubriko pri donacoj. Ĉu simila rubriko ekzistas en IPR kun indiko de celoj de mondonacoj kaj informiloj – kiel varbilo por ili?

Ahmad subtenis tiun proponon kaj proponis aprobi ĝin kaj peti nian redaktoron fari tiun varbilon-informilon.

Alessandra Madella: estas propono de la sinjoro Semio, kiu havas multajn konatulojn-enterprenistojn. Ni devas pensi, kiel iri al ili, ĉar vere estas amo varbadi iliaflanke. Sed ni devas trovi manieron proponi tion al ili, ĉar ĝisnuna propono ne funkcias. En IPR estas skribite, ke oni pagos monon por la redaktado de afiŝoj, tio signifas, ke por varbado pere de la redaktoro. Tio ne sufiĉas, devas esti skribite, ke mono estos por la revuo mem, por papera eldono. Ni devas ŝanĝi la tekston kaj, laŭ Alessandra, povos peti pli da mono ol nun. Nun pli kaj pli da revuoj iĝas bitaj, kaj havi paperan revuon estas tre prestiĝa, precipe kiam ni rilatas kun aŭtoritatoj. Ŝi proponis peti al sinjoro Semio, kiel pli bone prezenti la monpeton al ĉinaj enterprenistoj.

Ahmad proponis, por Alessandra demandu tion. Jes, ŝi faros ekde septembro. Konsentite.

Poste okazis voĉdono pri la buĝeto: unuanime. **Decido: la Buĝeto 2025 estas aprobita.**

**Punkto 12. Anonco de la loko de la ILEI-Kongreso de 2026.**

Ahmad diris, ke ni jam povas tion anonci kaj invitis fari tion Alessandra-n Madella-n. ILEI estas klopodanta havi la kongreson -2026 en Universitato de Zaozhuang. La estro de la Universitato jam sendis la leteron al Ahmad. Kaj ni petis sinjoron Jado, la sekciestro de ĈEL, informi ĉinan E-ligon pri tio kaj ni preparas dokumentojn por septembro por havi

kontrakton. Tio estos, verŝajne, iom alispeca kongreso ol antaŭaj ĉar en Ĉinio estas rigoraj postuloj pro diversaj kialoj. Ekzemple, la kongreso estos pli mallonga kaj la tuta turisma programo okazos ekster la oficiala kongreso – antaŭ aŭ post ĝi. Tamen la tuta kvanto da tagoj povos esti sama tiel. La Universitato provizos salonon, klasĉambrojn, eble, urban transporton. Estas 6 personoj, kiuj havos stipendiojn de la Universitato kaj de la Muzeo kaj helpos en organizado. Ili estas spertaj tiuflanke.

Marc Cuffez demandis pri la datoj de la kongreso.

Alessandra diris, ke ĝustaj datoj ankoraŭ ne estas sciataj, probable, antaŭ aŭ post UK. Ĉar UK estos en Eŭropo, oni devas konsideri bezonatan tempon inter du aranĝoj.

Ahmad diris, ke ni scios ĉion. La Estraro kredas, ke Ĉinio havas apartan valoron por Esperanto kaj la E-movado por ĉiuj organizoj – ILEI, UEA. La Prezidanto de UEA Duncan Charters vizitis Ĉinion. Kaj ĝenerale Ĉinio nun estas la lando, kiu pleje oficiale subtenas Esperanton de jardekoj - ĉu rilate al oficiala agnosko en lernejoj, aŭ al radio ktp. Arko faris prelegon pri tio. Ni kredas, ke kongreso en Ĉinio donos plian stimulon ankaŭ al niaj ĉinaj samideanoj. Ahmad proponis fari demandojn/komentojn.

Venis demando, kie eblas trovi novaĵojn pri la kongreso? Alessandra respondis, ke ĉio estos en la retejo de ILEI. En septembro ni esperas havi pli detalan informon kaj novaĵojn pri la kongreso.

**Punkto 13. Anoncoj de la komitatanoj.**

Ahmad proponis anonci iun ajn informon.

Marc Cuffez informis, ke tri jaroj antaŭ li anoncis en ILEI-Belgio, ke li ne plu volas esti sekciestro kaj eĉ la membro de ILEI. Marc ricevis unu pozitivan respondon de homo el Antverpeno, tamen pasintjare tiu homo iĝis la Prezidanto de la oficiale neekzistanta Asocio de la Belga E-Federacio, kiu nur ekzistas por UEA.

Marc ricevis la leteron de Kristin Tytgat, ke ŝi ne plu volas esti komitatano de ILEI por 2026. Do, eble venontjare Belgio ne plu havos sekcion. Marc parolos pri tio dum la Beneluksa kongreso en oktobro en Germanio. Do, ni vidos, kio okazos. Tial Marc petas de Jozefo Nemeth forpreni sian nomon el la listo de respondecaj redaktoroj.

Jozefo rimarkis, ke, se oni forprenos nomon de Marc, oni devas trovi alian nomon.

Alessandra demandas, ĉu nova redaktoro devas esti el Antverpeno?

Marc klarigis, ke antaŭe, kiam oni printis IPR-n en Bruselo, oni devis sendi ekzempleron al la Reĝa Nacia Biblioteko en Bruselo. Nun ne plu, ĉar IPR estas printita en Slovakio. Tamen Marc supozas, ke povos aperi problemoj, se lia nomo malaperos el IPR. Do, li konsilas trovi novan respondecan redaktoron, ekzemple, el Nederlando, ĉar oficiala adreso de ILEI estas en Haago.

Alessandra demandis, ĉu povos esti Jozefo mem?

Marc klarigis ke ne, Jozefo ne povas, ĉar li estas la redaktoro. Marc fakte plenumis alian rolon – pli ĝuste respondecan eldonanton, kiam IPR estis sendita el Antverpeno. Li ne scias pri aliaj landoj, sed en Belgio ĉiuj eldonaĵoj en ĝia teritorio devas esti senditaj al la Nacia Biblioteko. Tial li konsilas ekhavi la koncernan personon el Nederlando kaj ĝenerale bone pripensi tion.

Ahmad pardonpetis kaj anoncis, ke li devas foriri. Alessandra povos fini la kunsidon.

Zsófia Kóródy salutis ĉiujn el Herzberg, kie ĵus okazas intensiva somera kursaro kun 3 niveloj. Kaj tiu du-semajna kursaro akceptis oficialan agnoskon de la ŝtata instanco kiel klerigcela feriumado. Tio estas granda ŝtata agnosko, ĉar tiel la organizantoj rajtas havi proprajn atestilojn kaj la lernperiodo estas kalkulata kiel pagita ferio por laboristoj, kiuj ĉe iliaj laborejoj volas pruvi, ke ili partoprenis la lernadon por ricevi pagitan feri-tempon. Aplaŭdojn al Zsófia kaj Peter!

Dider Janot atentigis, ke dum la ĵusa Komitatkunsido preskaŭ 2/3 estas retaj partoprenantoj kaj nur 1/3 estas ĉeestaj. Tiu hibrida formato kaŭzas malfacilaĵojn. Tial Dider proponas, ke ĉiuj sekvaj Komitatkunsidoj estu nur retaj ekster la tempo de kongresoj, ĉar ĉeestaj partoprenantoj ne povas viziti aliajn samtempajn programerojn.

Alessandra proponis, ke la Estraro parolu pri tio kaj decidu. Ekzemple, la kunsido pri aprobo de nova kontrolisto certe okazos ekster la kongreso.

Nina Daniljuk dankis ILEI-n pro la subteno de la ukraina sekcio kaj de ŝia partopreno persone en la kongreso en la severaj kondiĉoj de la okazanta milito.

Mireille Grosjean revenigis al la problemo, kiun levis Marc. La oficiala sidejo de ILEI estas en Nederlando kaj la stato, ke Marc Cuffez estas respondeca eldonanto, ligiĝas baze al tiu numero ISSN, kiu validas por ĉiuj revuoj. Estas kompreneble, ke Marc volas ŝanĝi la staton, sed Mirejo opinias, ke tiu modifo povas esti malfacila. Dependas de la leĝoj en

Nederlando, en Belgio. Pri respondeca eldonanto oni decidis antaŭ jardekoj. Do, Mirejo dubas, ke eblas nun ŝanĝi. Ni provu. Esplorenda afero.

Marc konfirmis, ke ISSN estas el Belgio. Li jam priparolis tion kun Jozefo. Preskaŭ ne eblas ŝanĝi.

Marija skribis, ke estas universala ISSN.

Mirejo konsentas, ke devas esti iu tutmonda bazo kaj devas esti iuj oficejoj en la landoj. Kaj oni povas informiĝi tie, i.a. pri koncernaj leĝoj kaj reguloj.

Marc proponis, ke povas esti iu alia membro el Belgio.

Mirejo konsentis, ke la plej facila vojo estos, se persono restos el Belgio. Ŝi ankaŭ demandis, ĉu Marc povos informi pri Germain Pirlot.
Marc respondis, ke li estas en maljunulejo kaj sentas sin iom pli bone. Kaj li estas tre feliĉa, ke li povas ankoraŭ paroli Esperanton (dum vizitoj de Marc, ekzemple). Germain ne povas mem viziti, ekzemple, familiajn festojn kaj ricevas kartojn kaj donacojn.

Mirejo petis Marc sendi la retadreson de Germain al la komitatanoj por ke ili sendu poŝtkartojn el siaj landoj. Konsentite. Mirejo ankaŭ informis, ke Germain Pirlot skribis pli ol 7 000 leteroj por esperantigi afrikanojn kune kun Hans Bakker kaj Renato Corsetti. Multaj afrikanoj memoras ilin.

Marc aldonis, ke Germain Pirlot donis 635 eŭrojn por la fondaĵo en DR Kongo. Li volis, ke ankaŭ aliaj donacu monon por tiu fondaĵo.

Plu ne venis demandoj/komentoj/aldonoj.  Fine Alessandra petis, ke Marc plu esploru pri anstataŭanto por IPR, dankis ĉiujn pro partopreno en la Komitatkunsido kaj adiaŭis ĉiujn.

La kunsido finiĝis.

La sekretarino de ILEI Elena Nadikova.